ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




## Kongresa numero 2012

**Numero 7-9/2012**

**Julio-Septembro 2012**

**JARKOLEKTO 109 - N. 1092-1094 - Julio/Septembro 2012**
*Finpresita la 10.11.12* — Finito di stampare il 10.11.12

***Sur la kovrilo:*** *Bildoj el la Kongreso de IKUE 2012: de la 14a ĝis la 21a de julio ĝi okazis en Pécs (Hungario): ĉi tiu numero de EK proponas vastan raporton pri ĝi.*

## ENHAVO

### LA IKUE-KONGRESO 2012 "NIA 65a"

La hungara urbo **Pécs** gastigis nian ĉi-jaran kongreson 43

**Unua tago:** "Esperantistoj por la riĉigo de nia kristana kredo kaj kulturo" 44

**Dua tago:** Arto, kredo, liturgio kaj kulturo 45

**Tria tago:** Pilgrimantoj laŭ la spuroj de Maria 47

**Kvara tago:** Movadaj temoj, teknologio, muziko, sed ĉiam kun la rigardo al Dio 49

**Kvina tago:** Prelegoj kaj urbomalkovro 51

**Sesa tago:** La kredo laŭ la Biblio kaj laŭ la ekzemplo de la kredantoj "kiuj iris antaŭ ni" (speciala rememoro pri diakono Kirsch) 54

**Sepa tago:** Gloro de la Kruco – lumo kiu trarompas la malhelon de pekado 58

**Oka tago:** Adiaŭo per dankemo 60

**Radio Vatikana**, 43

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978


Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# MI KREDAS JE UNU DIO
## *La IKUE-kongreso 2012 "Nia 65a"*



De la 14a ĝis la 21a de julio okazis en Pécs (Hungario) la ĉi-jara 65a IKUE-kongreso.

Aliĝis 68 kongresanoj. Laŭlande: Brazilo (1, kiu ne povis ĉeesti), Ĉeĥio (11), Francio (2), Germanio (8), Hungario (14), Italio (12), Kroatio (2), Pollando (15) kaj Slovakio (3). Al unuopaj programeroj aliĝis ankaŭ lokaj esperantistoj, membroj de la Fervojista E-grupo.

La kongresa temo estis: "Mi kredas je unu Dio", elektita antaŭvide al la "Jaro de la Kredo", proklamita de Papo Benedikto la 16a en la 50a datreveno de la malfermo de la 2a Vatikana Koncilio.

Pécs estas la kvina plej granda urbo en Hungario. Ĝi plutenas multajn memoraĵojn de sia pasinteco: arkeologiajn restaĵojn de la romia periodo, palacojn, preĝejojn, grandajn placojn kun ornamitaj fontanoj, monumentojn, statuojn. Ĉio atestas riĉan kulturan harmonion, ŝuldeblan al enviciĝo de malsamaj etnoj: hungara, kroata, ŝvaba, araba. En la urbo jam delonge kunvivas pace etnoj el malsamaj originoj kaj moroj. En 1998 UNESKO nomumis ĝin "Urbo por la Paco" pro ĝia flegado de minoritataj kulturoj kaj la akcepto de forfuĝintoj el balkanaj militoj. La kongresejo estis la cisterciana gimnazio "Ludoviko la Granda" en la urbocentro, kies unua funkciado kiel edukejo datiĝas de 1687.

Jen la kroniko de la tagoj de la esperantistaj katolikoj en tiu mirinda kongresurbo. Ĝi estas la resumo de la precizaj raportoj publikigitaj ĉiutage en la kongresa kuriero "Mi kredas", redaktita de la estrino de la organiza komitato, Marija Belošević.


**RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto**

*La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama* **horo 21.20 MET** (19.20 UTC)**, DIMANĈE** kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE kaj ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta. **Por aŭskulti ilin per la Interreto:**

**rekte je la indikita horo:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp
**laŭpete:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp
**arkivo:** http://www.radio-vatikana-esperanto.org


*Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.*

*Skribu al:* **RADIO VATIKANA - ESPERANTO**
**SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**
**Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>**



HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

## Unua tago: sabaton la 14an de julio:
## "Esperantistoj por la riĉigo de nia kristana kredo kaj kulturo"



La kongreso komenciĝis inde per Meso celebrita en la franciskana preĝejo: povis partopreni ne ĉiuj kongresanoj, ĉar multaj el ili estis ankoraŭ survoje el siaj landoj, sed la spirita etoso estis same intensa. Sekvis la inaŭguro en la Ŝtona Muzeo apud la katedralo kun la ĉeesto de la episkopo de Pécs d-ro György Udvardy. La ĉeestantojn salutis la prezidanto de IKUE Giovanni Daminelli kaj la estrino de la kongresa organiza teamo Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE. Sekvis la bonveniga episkopa parolado per kiu oni inaŭguris la Kongreson.

Mons-ro Udvardy, post amoplena saluto, faris komparon inter la kristana kredo, kiu "kreas kulturon, en kiu ĉiu popolo, gento povas senti sin hejme" (kiel okazis "en urbo Sopianae en la Romia Imperio" kaj ankoraŭ okazas "en la hodiaŭa Pécs") kaj la frata komunumo kaj la komuna lingvo Esperanto bazita sur la agoj de la amo: ĝi estas sperto de unueco, en kiu "la lingvo estas fundamente kaj esence la lingvo de la amo". "Tiu komuna lingvo – daŭrigis la episkopo - estas unuavice faro de la Spirito. La Spirito de Dio kreas ja unuecon: ĝi estas tiu unueco, kiun Jesuo deziris kaj kiun Li per sia ofero realigis. Ĉiu, kiu alportas, konstruas tiun unuecon kaj laboras por ĝi, tiu servas kiel infano de la Eklezio". Mons-ro Udvardy sekve konstatis, ke la kongresanoj restas kune ĝuste laŭ tiu "nova maniero de frateco kaj unueco" kaj "formas kulturon pere de la lingvo Esperanto: por la riĉigo de nia kristana kredo kaj kulturo". Antaŭ ol beni ĉiujn, la episkopo esprimis la deziron, ke la "kongreso servu la spiritan, animan riĉiĝon de la alte respektindaj partoprenantoj, la enprofundiĝon en nia kristana kredo". Precipe bonan okazon por la preparo al la Jaro de la Kredo donas la elektita temo de la kongreso: "Mi kredas je unu Dio".

Kaj la enkondukon al ĉi tiu kongresa temo, post muzika paŭzo proponita de la Ĉambra Ĥoro *Fenikso* (kiu kantis ankaŭ en Esperanto) faris la episkopo mem, parolante pri "Naturo de la kredo – kredo kiel donaco". La prelego estis en la hungara kun samtempa traduko de p. Attila Szép, episkopeja kanceliero, kunorganizanto de la kongreso.

La kredo, kiu donas savon kaj eternan vivon – diris la episkopo – estas samtempe "granda donaco por nia vivo kaj ankaŭ granda tasko": ni havas ĝin, ĝi estas nia kaj samtempe "ĉiutage denove ni devas lukti por ĝi kaj kun/per ĝi". Kaj kiu estas la naturo kaj esenco de nia kredo? La respondo estis klara: kredi estas libere. Gravas, ke la homo libere respondu al Dio. La homo estas tute libera akcepti aŭ malakcepti la kredon kaj tio "estas konvena por la digno de la persono, ĝi estas nemalhavebla elemento". Sed la libera akcepto de la kredo – admonis la episkopo – ne signifas limigon de la libereco de la homo: male, la kredo "riĉigas, nutras kaj daŭre kreas" tiun liberecon. En sia prelego

mons-ro Udvardy ankaŭ atentigis pri la homaj aspektoj de la kredo, ĉar “ni kredas laŭ homa maniero, kaj nia homa naturo ludas gravan rolon en la esenca sperto de nia kredo”. Fine de la prelego li ankaŭ memorigis, ke la vorto “Amen” venas el la sama radiko kiel la vorto kredi, kiu signifas firmecon, fidindecon, fidelecon. Oni komprenas do, ke dirante “Amen” ni esprimas la fidelecon de Dio al ni kaj same ankaŭ nian fidon al Li: Dio de la vero kaj Dio de Amen, fidela al siaj promesoj.

La inaŭguro finiĝis per la preĝado de Anĝeluso, per kanto kaj episkopa beno.

Menciindas, ke dum la unua kongresa tago la bonvenigan servon ĉe la stacidomo prizorgis la loka fervojista E-grupo.



*Pastro Lajos Kőbor kaj episkopo Udvardy.*

## *Dua tago: dimanĉon, la 15an de julio*
## Arto, kredo, liturgio kaj kulturo



La dimanĉa tago komenciĝis per vizito al la prakristana tombejo el la 4a jarcento, kiun la Komitato de Mondheredaĵoj (UNESKO) registris en la liston de kulturhistoriaj valoraĵoj, ĉar la malkovrita areo de konstruaĵoj havas tiel variajn arkitekturajn elementojn kaj murpentraĵojn, ke ili nekutime, multflanke kaj varie prezentas la fruan kristanan tombejan arkitekturon kaj arton. Ili estis karakterizaj en la nordaj kaj okcidentaj romiaj provincoj. La subteraj kriptoj kaj la tombaj kapeloj atestas la persiston kaj kredon de la kristanaj komunumoj, kiuj vivis en Eŭropo dum la malfrua epoko de Romio; aliflanke tiuj konstruaĵoj prezentas la radikojn de la kulturo kaj civilizacio, kiuj vivas kaj efikas ĝis nun.

Reveninte al la kongresejo, Carlo Sarandrea skize resumis la apostolan leteron en formo de *“Motu proprio”* (meminiciata dokumento) *“Porta Fidei”* de Benedikto la 16a. Per ĝi la Papo starigis la Jaron de la Kredo. Ĉefa motivo de la Jaro estas la nova evangelizado, kiu estas konstanta fadeno de la agado de la Papo, kiu eĉ starigis Kongregacion dediĉitan al ĝi. Ankaŭ en siaj paroladoj dum la ĝeneralaj aŭdiencoj la Papo ĉiam faras katekizadon. La preleganto atentigis, ke ne estas la unua fojo, ke okazas Jaro de la Kredo: ĝis nun ĝi okazis dufoje, koincide kun gravaj kristanaj datrevenoj kaj apartaj historiaj momentoj. La Jaro de la Kredo 2012/2013 koincidos kun la datreveno de la komenco de la 2a Vatikana Koncilio kaj la datreveno de la apero de la Katekismo

de la Katolika Eklezio, unu el la rimedoj, kiujn la Papo indikas en la apostola letero kiel valoran ilon por antaŭenpuŝi la novan evangelizadon.

Do, 50 jarojn post la koncilio la okazigo de la Jaro de la Kredo utilos ankaŭ por kompreni ĝian heredaĵon, kiun la Papo priskribas kiel grandan orientadon por la agado de la Eklezio. La celo de la Jaro de la Kredo estas "plifortigi nian fidon", instigi ankaŭ la pastrojn unuavice roli por veki la kristanojn, por skui la konsciencon kaj havi pli profundan konsciiĝon pri la fakto, ke ni estas kristanoj.

Dum la prelego estis prezentita ankaŭ la traduko de *Porta Fidei,* kiun, okaze de la 65a Kongreso de IKUE, tradukis: Doris Legat (Aŭstrio), Vitor Luiz Rigoti dos Anjos (Brazilo), Daniel Chevalier (Francio), Carlo Sarandrea (Italio), Mike Leon (Novzelando), Bogusław Sobol (Pollando) kaj Pavol Petrík (Slovakio); reviziis Attila Szép (Hungario) kaj Antonio De Salvo (Italio). La teksto estas disponebla en la TTT-ejo de IKUE:

http://www.ikue.org/papoj/benediktoxvi/2011/porta%20fidei.pdf.

La vizito al la urba Katedralo de sanktaj Petro kaj Paŭlo, al ĝiaj trezoro kaj kripto, markis la komencon de la posttagmeza programo, kun rozaria preĝo kaj la Meso ĉefcelebrita de pastro Attila Szép kun pastroj Luigi Alfano kaj Hatto von Hatzfeld.


*Meso en la Katedralo.*

Komence de sia prediko pastro Szép aparte atentigis pri la vortoj de la liturgio (Mar 3,12-15), laŭ kiuj Marko diras, ke "Jesuo alvokis al si la dek du apostolojn, kaj komencis sendi ilin duope tien kaj aliloken". "Povas esti, ke ni aŭdis la plej malnovan regularon por laboro – li diris. Ne estas longa listigo de tio, kion oni rajtas kaj ne rajtas fari: Jesuo diras nur du aferojn al la disĉiploj: ili devas iri sen rimedoj kaj oni ne rajtas esti perfortaj, se iu kontraŭstaras. "Esti sen rimedoj eble sonas ŝokige - diris p. Szép - ĉar ni kutimas multon havi", sed tio ne signifas, ke ni ne uzu la novajn rimedojn por la evangelizado: dum ni fariĝas predikantoj, anoncantoj de la evangelio, ni proklamas la vortojn de Dio, la vivantajn kaj efikajn vortojn de Dio, kaj sekve ni devas kredi je la potenco de la dia Vorto. Do, oni estas sen rimedoj sed ne solaj, ĉar Dio akompanas nin laŭ la vojo kaj Li donas ĉion, kion ni bezonas por nia misio. Krome pastro Szép akcentis la frazon: "Jesuo sendis ilin duope"; tio donas multajn avantaĝojn, diris la ĉefcelebranto, ĉar eblas reciproka helpo, fortigo, interkonsiliĝo, divido de taskoj laŭ la ricevitaj donacoj de Dio: entute, esti en komuneco, por povi konfesi la kredon kune per la vortoj 'ni kredas'". Lastan komenton pastro Szép faris pri la unua biblia legaĵo (Amo 7,12-15) pri la vokiĝo de Amos, simpla homo, kiu akceptis la vokon de Dio; ĝi estas voko, kiun Dio adresas ankaŭ al ni ĉiuj: per persona biografia noto pastro Szép deziris konfirmi tion ĉi: "Mi ne estis profeto, nek filo de profeto, sed inĝeniero kaj Dio vokis min el la atomcentralo kaj sendis min al sia popolo. Ni ĉiuj estas vokitaj, ni ĉiuj faras la saman mision. Nin ĉiujn vokas Dio por prediki la evangelion per vortoj, faroj, vivo-ekzemploj".

Dum la Meso orgenludis Stefan Lepping kaj Franz-Georg Rössler; akompanis flute Rita Rössler.



*Franz-Georg Rössler*

Post la Meso la kongresanoj atingis la episkopan palacon, kaj post ĝia vizito oni aŭskultis la prelegon de Rita kaj Franz-Georg Rössler pri "Franz Liszt kaj la koncepto de la muzika unueco". Notindas, ke la prelegantoj substrekis, ke ili deziris omaĝi al la granda muzikisto kaj ĝenerale al la hungara muziko, kiu senmezure kontribuis al la muziko de la mondo. Dum la prelego estis prezentita la vivo-itinero de Liszt, sed same de lia familio, kaj la enplektiĝoj kun la vivo de aliaj gravaj komponistoj. Bedaŭrinde malfruanta programo devigis la prelegantojn resumi sian prezenton.

Post vespermanĝo la dua kongresa tago finiĝis per la orgenkoncerto de Stefan Lepping



*En la fasado de la episkopa palaco, en kiu Liszt mem loĝis, staras lia statuo kliniĝanta de balkono "por pli bone aŭdi la sonorilojn de la katedralo".*

en la franciskana preĝejo. La orgenisto prezentis la verkojn (preludoj, fugoj kaj kantprilaboroj) de Bach, Böhm, Buxtehude, tri germanaj barokaj komponistoj, kun komparo kun la Esperanta traduko en "Adoru".

## Tria tago: lundon, la 16an de julio
## Pilgrimantoj laŭ la spuroj de Maria



Dum la tria tago la partoprenantoj pilgrimis al la plej granda hungara Maria pilgrimejo Máriagyűd. Ĝi elstaras piede de monto kie en la jaro 1006 iuj abatoj konstruis kapeleton, en kiun la lokaj kristanoj metis statuon de la Madono. Pro la invadoj, dum sia historio ĝi fariĝis moskeo fare de Turkoj kaj poste ortodoksa kaj protestanta preĝejo fare de Serboj kaj Hungaroj. Pro tio la statuo malaperis de tie kaj nun troviĝas en la franciskana preĝejo de Osijek (Kroatio). Sur la monto okazis multaj miraklaj resaniĝoj, kaj la fideluloj alportis tien statuon de Doloranta Dipatrino, al kiu direktiĝas Krucvojo.

La Meson en Máriagyűd ĉefcelebris p. Lajos Kóbor; kuncelebris p. Luigi Alfano kaj p. Attila Szép. La ĉefcelebranto substrekis dum sia prediko la gravecon de la patrino en la familio, ĉirkaŭ kiu la familianoj kolektiĝas. "Tiel same – li aldonis - oni kolektiĝas ĉirkaŭ la ĉiela Patrino Maria en pluraj Mariaj pilgrimlokoj. Oni diras: *"per Mariam ad Iesum"*, "per Maria al Jesuo". Do, la ĉeesto

de la pilgrimloko ĉiam signifas, ke Maria kondukas nin pli proksimen al Jesuo. En la vivo de kredanto devas vidiĝi, ke ni estis ĉe Maria kaj ke Maria kondukas nin pli proksimen al Jesuo, kaj ĉio tio laŭ aŭtentika maniero. Kiel malan ekzemplon p. Kóbor menciis unu sian samvilaĝanon, kiu "fieris" pri plurfojaj vizitoj al Mariala pilgrimloko, sed hejme li kverelis kun sia frato kaj blasfemis: "ĉu vere tiu homo ŝanĝiĝis? Ĉu li pli alproksimiĝis al Jesuo?".


Krucvojo en Mariagyűd.

"Ofte – daŭrigis p. Kóbor - oni mokas nin pro ebla troiga estimo al Maria; sed nia estimo al Maria rilatas al la fakto, ke ni taksas


Pastro Kóbor celebras fronte al la statuo de la Dipatrino de Máriagyűd.

Ŝin nia ĉiela Patrino kaj Maria ĝojas pri siaj "infanoj, se ili amas pli bone ŝian filon, Jesuon". Konklude, "nia hodiaŭa pilgrimo havos sukceson en nia ĉiutaga vivo – ne nur dum la kongresaj tagoj – se reveninte el Mariagyűd, ni portos al niaj konatuloj ne iun bagatelaĵon aĉetitan kontraŭ mono, sed la ateston de la graco, kiun ni ricevis de Maria en niaj koroj".

Fine de la Meso antaŭ la ĉefa altaro fronte al la statuo de Maria la katolikaj esperantistoj renovigis sinkonsekron al Maria.

Post la meso oni preĝis la Krucvojon sur la apuda Kalvaria-monteto, ĉe kiu staras tombejo; oni preĝis ankaŭ por la mortintoj.

La tago daŭris per veturo al Siklós, kie, post la tagmanĝo en urba restoracio, oni vizitis la lokan parokan preĝejon kaj la grandan fortikaĵon, el kiu videblas belega panoramo.

Survoje al Pécs oni haltis en Villány, urbo konata pro vinproduktado: oni vizitis la plej grandan regionan kelon, kiu entenas gigantajn vinbarelojn. La kongresanoj (krom iuj hastantoj, kiuj aranĝis tion private) ne ĝuis gustumon de hungara vino, ĉar la kongresa programo havigis tion pere de posta, pli sukcesa, kongresa noktado.






*Sekretario Carlo Sarandrea kaj prezidanto Giovanni Daminelli gvidis la Asembleon de IKUE (malgraŭ la ŝajno, ili ne dormas....)*

La mateno de la 4a kongresa tago estis dediĉita al la Asembleo de IKUE: komence oni preĝe rememoris la mortintojn de la lasta jaro, inter kiuj 2 estis aliĝintij por la kongreso: p. Florio Giannini, p. Sándor Szénási, p. Carlo Capuzzi, diakono Johano Kirsch.

Sekvis la raportoj pri la agado kaj financaj rimedoj, kiuj donis superrigardon pri la pasinta jaro. Ĉefaj punktoj estas: funkciado de la CO de IKUE, eldonado de Espero Katolika, membraro, E-elsendoj de Radio Vatikana, ekumenaj rilatoj. Oni ankaŭ prezentis la raportojn kaj planojn de la landaj reprezentantoj kaj sekcioj de Brazilo, Ĉeĥio, Germanio, Italio, Kamerunio, Kroatio, Kubo, Latvio, Nederlando, Novzelando, Pollando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio. La raportoj reliefigis la diversajn agadmanierojn, sed ankaŭ la malfacilaĵojn, kiuj estas "karakterizaj" por unuopaj landoj. Rilate al la venontjara kongreso oni decidis, ke ĝi okazu en la regiono de Trento (Italio).

Parolante pri la estonta agado estis substrekita la neceso de strategio aŭ direktilo el kiu generiĝas unu- kaj plurjaraj planoj de IKUE. En la strategio la ĉefaj punktoj estus: membreco (servoj, varbado, organizo de etaj rondoj laŭ la intereso/fako de la membroj), informado (Espero Katolika, Radio Vatikana, kaj en- kaj ekster IKUE), eksteraj rilatoj kaj kunlaboro (en E-ujo kaj ekster ĝi, ĉeesto en la aranĝoj), liturgia komisiono (revizio de la Meslibro, subteno al la lokaj organizantoj de la Mesoj en E-o, k.a.).



*Meso en la Preĝejo eksa Moskeo.*

Kun ĝojo oni informis, ke aŭtune IKUE havos TTT-ejon kun tute nova "vizaĝo".

Komence de la posttagmeza programo okazis iu ne kongres-tema, tamen interesa programero: komputila kurso gvidata de Carlo Sarandrea, kiun ĉeestis pluraj kongresanoj.

Poste, trairinte la straton fronte al la kongresejo, oni eniris la Preĝejon eksan Moskeon, por muzika horo per orgeno kaj fluto, gvidata de gesinjoroj Rössler. Temis pri programero, kiu ne estis

nur pura koncerto, sed kiu donis eblecon al la ĉeestantoj ankaŭ kunkanti unuopajn muzikpecojn akompane per orgeno kaj fluto.

Sekvis Meso por la unueco de la kristanoj ĉefcelebrita de sac. Hatto von Hatzfeld. La "dialogo inter sankta Francisko kaj Sultano Malek-el Kamil" estis la deirpunkto de lia prediko: ĝi estas ekzemplo de sukcesa dialogo inter anoj de du religioj, li diris, tamen konstatante, ke "ĝi bedaŭrinde ĝis nun estas malofta".

Hodiaŭ multaj vivas najbare al alikredantoj: ĉi-koncerne p. Hatto menciis la fakton, ke en lia paroĥa teritorio la nombro de islamanoj kvazaŭ egalas tiun de la katolikoj. Kaj kvankam la kontaktoj inter la religioj multobliĝis, ni, kristanoj, ofte agas malsperte kaj malcerte, ĉar, li diris, oni inklinas al du ekstremoj: aŭ ni estas konvinkitaj, ke ni devas konverti la aliajn, por ke ili ne perdu la savon, aŭ ni pensas, ke ĉiu ajn vojo taŭgas por atingi la celon, kaj do ĉiuj simple vivu trankvile kaj pace unu apud la alia.

Ambaŭ pensoj estas iel pravaj. Sed ambaŭ povas iĝi ideologioj. Nome, unuflanke estas la fanatikismo, kiu neas la vivorajton de alipensantoj kaj aliflanke la ŝajna toleremo, laŭ kiu fakte ĉio estas samvalora aŭ malsamvalora, do indiferenta.

Sed ambaŭ pens- kaj agadmanieroj perfidas la mision, kiun ni ricevis de Jesuo, atentigis p. Hatto, kiu ankaŭ substrekis, ke la fama dialogo inter Francisko kaj Malek-el Kamil (1219) povas helpi nin por pli bone dialogi kun la alikredantoj de nia tempo.



*Survoje al la "episkopa kelo". Fone, la katedralo de Pécs.*

Tiukoncerne li atentigis pri tri aspektoj, kiuj karakterizas ĉi tiun dialogon.

La renkontiĝo: por vera dialogo oni devas interesiĝi pri la aliulo, pri ties persono, pri liaj pensmanieroj kaj konvinkoj. Dialogo sukcesas nur en la konvinko, ke la aliulo povas malfermi novajn horizontojn ankaŭ por mi.

Ekzemplodona vivo: Francisko sukcesis konvinki la sultanon pri sia honesteco pere de sia vivmaniero. Li fakte travivis la veran signifon de la kredo. Eble la elkora donaco, per kiu Francisko vidis ĉiun homon, estas taŭga gvidlinio en niaj klopodoj.

La tria aspekto, kiun Francisko montris antaŭ la Sultano, estas bone esprimita en la hodiaŭa evangelio: "ni estu enradikigitaj en Kristo!". Francisko povis vivi sian elkoran bonecon nur, ĉar li sciis kaj vivis komplete en Kristo Jesuo. Kiu ajn volus vivi tian bonecon nur por si mem, tiu spertus seniluziiĝon kaj malsukceson aŭ trompus sin mem pri siaj kapabloj. Se ni lasas nin esti transformitaj de la amo, ni estas unuiĝintaj en Kristo kaj povas kun karitato dialogi kun la aliaj, eĉ kun alikredantoj, nekredantoj aŭ malamikoj. "Ni do petu al Dio, ke li faru el ni iloj de paco", fine preĝis p. Hatto.

La vespera programo disvolviĝis en la episkopa kelo, kie post la vespermanĝo sekvis gaja vespero kun kantado kaj loterio favore al la kongresa kaso.



*En la "episkopa kelo".*

## *Kvina tago: merkredon, la 18an de julio*

# Tago de prelegoj kaj de urbomalkovro



La tago komenciĝis per Meso ĉefcelebrita de pastro Luigi Alfano en la Preĝejo eksa Moskeo kaj poste la tutan matenon oni dediĉis al 3 prelegoj. P. Attila Szép prezentis la vivon de sankta Maŭro episkopo de Pécs, benediktana abato de Pannonhalma. Laŭ la tradicio li naskiĝis en hungara familio ĉirkaŭ la jaro 1000. La loko de lia naskiĝo ne estas tutcerte konstatebla; verŝajne ĝi estis ĉirkaŭ Nitra, nun en Slovakio, tiam apartenanta al la hungara reĝlando. Dum la regado de reĝo sankta Stefano, li jam estis lernanto en la monaĥejo de la monto de Sankta Marteno. Ĝi hodiaŭ nomiĝas Pannonhalma.

La nomon Maŭro li ricevis en la monaĥejo. Maŭro estis la unua disĉiplo de sankta Benedikto, kaj li krome estis la unua el la hungardevenaj benediktanaj monaĥoj, kiuj komence de la ordeno en Pannonhalma estis bavaro-devenaj, german-devenaj. Meze de la 11a jarcento francoj prenis la gvidadon. Grava dokumento pri la vivo de sankta Maŭro estas lia letero pri la fondo de la abatejo en Tihany (ĉe Balatono) en la jaro 1055: inter la latinaj frazoj de tiu dokumento ni trovas la unuajn hungarlingvajn fragmentojn.

La meslibroj eldonitaj en la 15a jarcento mencias Maŭron kiel sanktulon, kaj lia nomo aperas ankaŭ en la nomlisto de martiroj (t.n. *Martirologium*). Beata Papo Pio la 9a (la 4an de aŭgusto 1848) aprobis kaj konfirmis la publikan kultadon al li en diocezo Pécs. Tiu papa aprobo donis fundamenton de la novepoka kulto al sankta Maŭro. Lian feston oni solenis la 4an dimanĉon de oktobro; la feston poste en la jaro 1913 oni fiksis je la 25a de oktobro: en tiu tago la diocezo solenas en la katedralo feston por la instruistoj de diocezaj katolikaj lernejoj. Papo Pio la 11a (la 4an de decembro 1925) deklaris sanktan Maŭron kunpatrono de la diocezo. En Pécs lian nomon portas strato en la centro, kapeloj en la katedralo, la centra Preĝejo eksa Moskeo kaj ankaŭ katolika lerneja centro.

La duan prelegon titolitan "Unu Dio, unu Eklezio: multaj kredoj, unu homaro" prezentis Stefan Lepping. La ago de kredo konsistigas la rilaton inter Dio kaj la kredanto: tio okazas ambaŭdirekte, ĉar Dio povas doni la gracon, ke iu kredu, kaj la homo akceptas tiun donon. Kredo ankaŭ ne nur estas intelekta afero aŭ ideologio, aŭ idearo mensa. La plena senco de

kredado ankaŭ inkluzivas fidadon kaj amon al Dio, kio koncernas ne nur la pensadon, sed la tutan vivon. En plena formo, kredado estas iu sintransdono al la bona Dio; kaj per ĝi la homo gajnas sian plej altan dignon kiel infano de Dio. Ĉar samtempe Dio Sin transdonas al li.

En la mondo, tiu rilato kun Dio kutime estas pli aŭ malpli damaĝita. Pekado kaj la sperto de malbono malhelpas la homojn ekkoni kaj ekfidi la simplan veron pri unu bona Dio, kiu nin gvidos patre tra ĉi tiu mondo, al plena feliĉo en la transa mondo, kune kun la aliaj savitoj kaj kun Li mem.

Ekzistas kono de Dio, kaj de Vero ĝenerale, per du fontoj: unuflanke revelacio aŭ inspiro, kaj duaflanke perceptado per la sensoj, kaj homa pensado. Pri tio temas la tre valora encikliko de Johano Paŭlo la 2a *"Fides et ratio"*, en kiu unu el la bazaj frazoj estas: "per du flugiloj la animo sin levas al la ekkono de Dio: la Fido kaj la Racio". Tiuj du elementoj tamen interefikas kaj interkunlaboras por la kredo. Por ne erari pri Dio kaj la Homo kaj la Vero ĝenerale, oni bezonas kaj puran tradicion de religio kaj de kristana humanismo, kaj rektan inspiran rilaton al la vivanta, ĉeestanta Dio. La fama koncilia teologo Karl Rahner profetis, ke "la kristano de la estonteco estos mistikisto (t.e. iu, kiu spertis Dion), aŭ li ne plu estos". Efektive, la pludonado de kristana tradicio estas en okcidentaj socioj en profunda krizo.

Mi kredas je unu Dio, ... unu sankta, katolika, apostola Eklezio. Kial unu Eklezio? – daŭrigis Stefan: Jesuo volas kaj preĝas al la Patro, ke ĉiuj estu unu, kiel Li estas unu kun la Patro. La unueco (en amo) estu signo de Dio kaj de la vero de la instruo de Jesuo, por ke la mondo kredu, ke la Patro sendis Jesuon. Alimaniere dirite: la Eklezio, aŭ pli ĝenerale la popolo de Dio, estas kiel familio de Dio.

Se oni komprenas tion en konkreta senco, ne estas eble, ke estu du aŭ pli da familioj. En familio povas esti interfrataj kvereloj, miskomprenoj, skismoj, sed tamen ĝi estas unu familio. Kaj restas espero, ke tiuj skismoj povos esti sanigataj. Finante la prelegon, Stefan diris: "La savo venas de Jesuo (kaj perita de Lia Eklezio); ĉu la mondo jam plene komprenas tion aŭ ne? Dio vidas la koron de homoj kaj havas multe da pacienco kaj toleremo kaj espero, ke ankoraŭ venos bonaj fruktoj kaj vera konvertiĝo. Ni faru kiel li!".

Kaj la figuro de Jesuo el Nazareto estis je la centro ankaŭ de la tria prelego: Gottfried Noske prezentis la unuan volumon de la libro de Papo Benedikto la 16a pri Jesuo. La prelego celis referi al la pozitiva kaj negativa reago de teologoj, kiam aperis tiu volumo. La preleganto krome menciis la celojn de la Papo: li pritraktas ja science la vivon de Jesuo kaj ne forgesas mencii kaj kritiki la tiel nomatan historie-kritikan ekzegezon, kun la celo sanigi kaj superi la disiĝon inter la moderna kaj la tradicia eklezia ekzegezo. Benedikto 16a enkondukas al la personeco de Jesuo komparante lin kun Moseo, kaj sekve detale pritraktante la rilaton inter Izraelo kaj la Eklezio kaj la gravecon de la Malnova Testamento por la



*"Entrajniĝo" por ĉirkaŭiri la centron de la urbo.*

Nova Testamento. En tiu konekso Ratzinger tute klare distancigis sin de ĉiu kristana kontraŭjudaismo kaj konfesas sian altestimon por la juda teologio kaj la judaro mem. Gottfried plie citis la konvinkon de la Papo, laŭ kiu ne estas diferenco inter la prezentado de la vivo de Jesuo kaj de la tiamaj okazintaĵoj per la tiel nomataj sinoptikaj evangelioj kaj tiu laŭ Johano: en ili estas prezentata la vera historia Jesuo, kiu, laŭ li, estas pli logika kaj pli komprenebla ol la historiaj rekonstruoj de la lastaj jarcentoj. Je la fino la preleganto esprimis sian personan admiron pri la erudicio kaj lerteco, la modesteco kaj pieco de Benedikto la 16a, konsiderante ties tre altan taskon kaj oficon.


En biblioteko Klimo.

Konkludis la matenon de la prelegoj iom menso-malstreĉiga prezento: temis pri la bild-retrospektivo de la du lastaj IKUE-kongresoj (Parizo 2010 kaj Zagrebo 2011), kiun prezentis Miloslav Šváček (Ĉeĥio). La perfektan eldiron de franclingvaj nomoj certigis la gugla voĉ-sintezilo.

Kvankam la 65a Kongreso de IKUE okazis en la centro de Pécs, en ties ĉefplaco, la merkreda posttagmezo estis rezervita por la pli bona kono de la gastiganta urbo.

Unue ĉiuj kongresanoj "entrajniĝis" antaŭ la kongresejo kaj dum unu horo ĉirkaŭiris la centron de la urbo kaj la iom foran kvartalon Zsolnay. La gvidado okazis en Esperanto dank' al loka esperantistino Maria Eszes. Sekvis la komuna vizito al la Muzeo Zsolnay, en kiu estas videblaj la ornamaj produktoj de la fama ceramika fabriko: en ĝi estas prezentataj ankaŭ la mebloj, hejmaj instalaĵoj kaj ornamaj objektoj de familio Zsolnay. La domo, sidejo de la Muzeo, aperas citita en dokumento de la jaro 1324.

La vizito al la urbaj vidindaĵoj poste disvolviĝis en tri grupoj: la trarigardo de la urbocentraj vidindaĵoj (de ekstere) gvidataj de la membroj de la loka Fervojista E-grupo. La dua grupo vizitis bibliotekon Klimo, gvidata de Attila Szép kaj la tria grupo gvidata de Maria Eszes vizitis la moskeon de paŝao Jakovali Hassan.

Kvankam la resto de la posttagmezo kaj vespero estis libera, la kongresanoj kune kantis sur la ĉefa placo kaj poste aktive ĉeestis la surstratan instruadon de la kroataj dancoj, kiuj okazis sur la placo antaŭ la teatro, kiel montras la ĉi-suba fotografaĵo.


Instruado de kroataj dancoj.

## Sesa tago: ĵaŭdon, la 19an de julio

## La kredo laŭ la Biblio kaj laŭ la ekzemplo de la kredantoj "kiuj iris antaŭ ni"

*(speciala rememoro pri diakono Johano Kirsch)*



La prestiĝa episkopa palaco de Pécs gastigis la tri prelegojn de la sesa kongresa mateno. La unua estis proponita de ŝatata gasto: Viktor Nyúl, universita kapelano, profesoro de la teologia altlernejo en Pécs. Li akcentis la neceson – por plej bone travivi la baldaŭan Jaron de la Kredo - esplori la instruon de la Biblio. En la unua parto de la prelego li traktis pri la rilato al Biblio ĉu de kredanto ĉu de nekredanto, kaj kiu estas la kontakto inter la Biblio kaj la kredo.

La nekredanta homo trovas en la Biblio nur interesaĵon kultur- kaj literatur- historian kaj malnovan memoron. La kredanta homo opinias, ke la Biblio estas sankta libro, ĉar ĝi estas la kolekto de la Vortoj de Dio, kiujn la sanktaj aŭtoroj dum la jarcentoj surpaperigis. Do la kredanto vidas en la Biblio la formuligon de la Vortoj de Dio fare de homoj, kaj ankaŭ tiun libron per kiu la Sinjoro alparolas la homon kaj komencas dialogon kun li.

La skribita vorto staras je la centro de nia kredo, tamen kristanismo ne estas religio de libro. Ni ne adoras la Biblion, sed la enkarniĝintan Vorton, Jesuon Kriston, kiu parolas al ni per homaj vortoj. Tial la Biblio estas grava rimedo, por ke Dio atingu la homon; ĝi estas ponto. La sankta Skribo kaj la kredo estas en konekso unu kun la alia: ne ekzistas kredo sen la Biblio, kiu respegulas la Vorton de Dio, kaj ne povus naskiĝi la Biblio sen la kredanta komunumo, la Eklezio.



*Pastro prof-ro Viktor Nyúl kaj pastro Szép.*

Tion, kion la Sankta Skribo deziras diri pri la kredo, oni ne povas nur per unu vorto esprimi. La Biblio uzas nuancojn, diversajn esprimojn por malkovri la karakterizajn proprecojn de la kredo kaj por malkovri, kion signifas kredi je Iu. Ĉefe du vortoj elfoniĝas el inter la multaj terminoj priskribantaj la kredon: vorto *aman* (amen), kio signifas firmecon kaj sekurecon, kaj la vorto *batah*, kio signifas fidon, certecon.

La kredo estas iagrada kono pri Dio memkompreneble ne elĉerpebla, kompleta kono: Dion ja oni ne povas tute ekkoni. La kredo estas agnosko de la revelacio de Dio, ke ĝi estas vera. La unua paŝo estas paŝo de la Sinjoro, kiu parolas pri si mem, ekkonigas sin mem, kaj tion la homo akceptas, opinias vera kaj konfesas ĝin.

Laŭ la instruo de la Biblio kredo estas ankaŭ fido: ĉar la kredanta homo konfesas kaj akceptas la amon bonecan de Dio, tial li lasas sin al Dio, fidas al Li. La popolo Izraela tion spertis por la unua fojo dum la vagado en la dezerto: ĝi povas fidi je Dio, ĉar Li zorgas

pri sia popolo. Al tiu ĉi travivaĵo ĉiu kredanta judo ĉiam kaj ĉiam revenas por renovigi sian fidon je Dio, kiam malamiko minacas lin.

Ankaŭ en la nova Testamento ni multfoje renkontas la fidon je Dio, je Jesuo, kio estas esprimo de la kredo. Petro riskas sinki, kiam li ne plu alrigardas sian Majstron, kiam li dubas pri la forto de la vortoj de Jesuo.

La sankta Skribo interpretas la kredon ankaŭ kiel obeemon al la ordonoj de Dio. En la greka vorto obeemo (υπακοή) troviĝas la esprimoj de "aŭdo" kaj "sub". Do la obeema homo kiu aŭskultas la vortojn de Dio, laŭvorte estas sub la aŭdo, aŭskulto de la vortoj de Dio kaj agas laŭ tiuj. La kredo kiel obeemo signifas tion, ke la kredanta homo aŭskultas la vortojn de Dio, kaj tiel li formas sian vivon.

Kaj fine, la kredo havas ankaŭ komunuman dimension. Legante la Biblion ni ne "renkontas" nur unu kredantan homon sed multajn.

Post la prezento de la ĉefaj karakterizoj de la kredo kaj ankaŭ de la grandaj bibliaj figuroj de kredantoj, prof-ro Nyúl starigis la demandon pri la persona kontakto kun la vorto de Dio, pri la grado de ĝia kono ĉe kredantoj. Ja laŭ la instruo de sankta Paŭlo: "La fido venas do per aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de Kristo" (Rom 10,17). Por ke do nia kredo estu laŭbiblia ni devas pliprofundigi nian kontakton kun la vorto de la Sinjoro, aŭskultante la bibliajn tekstojn dum liturgioj kaj legante ĝin private. Estas grave, ke la legitajn liniojn ni pli kaj pli ekkonu kaj komprenu. Tion helpas la meditado pri la koncerna teksto kaj pristudo de ĝi helpe de iu klariga komentario.


Ágota Kirschné prelegas.

"Kardinalo Martini diris iufoje, ke la kristano estas feliĉa homo, ĉar ĉiutage legante la sanktan Skribon scias, kion de li Dio deziras. La Vorto de la Sinjoro tiel fariĝas referencpunkto de miaj tagoj laŭ kio mi povas ordigi mian vivon. Alivorte tion ni nomas kredo, tio estas obeemo al la Vorto de Dio kaj fidante al Dio mi vivas mian vivon, kiel faris ankaŭ Abrahamo, Maria kaj Jesuo".

Kaj en la fina parto la preleganto donis ekzemplon pri transformiĝo de vivo post aŭskulto de la dia Parolo. Li menciis la iaman ĉefrabenon de Romo, Israel Anton Zoller, italigita per Zolli (Brody, Ukrainio, 1881 – Romo, 1956): li, esplorante fidele la Biblion, fariĝis kristano kaj en 1945 baptiĝis kun la nomo Eugenio (honore al la tiama Papo Pio la 12a). Li ne zorgis pri la akuzoj de perfidemo levitaj de la roma hebrea komunumo, sed kun ĝojo ĉirkaŭbrakis la katolikan kredon. Iam jezuita pastro, amiko lia, trovis lin ploranta dum la legado de la Sankta Skribo. La iama rabeno alrigardis la patron kaj nur tiom diris al li: "Kiel feliĉaj vi estas, ĉar vi jam ekde via infanaĝo konas Jesuon, la Filon de Dio, la Elaĉetanton! Mi devis multajn jarojn esplori ĝis mi ekkonis Lin kaj kredis je Li". "Ankaŭ la emociiga vivovojo de Eugenio Zolli – finis prof-ro Nyúl – estigu en ni fervoron por la daŭra esploro de la vorto de Dio, por ke pliprofundiĝu nia kredo je Kristo Jesuo, laŭ la vortoj de la letero al Hebreoj" (Heb 12, 1-3).

La duan prelegon prezentis Ágota Kirschné. Ŝia prelego baziĝis sur la encikliko de Papo Johano Paŭlo la 2a *"Fides et ratio"*. Ŝi uzis la tradukon en Esperanton, kiun faris László Vizi. La prelegantino elektis la konkludajn partojn de la Encikliko, en kiuj Johano Paŭlo la 2a substrekas la gravan rolon, kiun "la filozofia pensmaniero havas por la kompreno de la kredo" (n-ro 100), kaj en kiuj li instigas la teologojn "malkovri ... la metafizikan karakteron de la vero" (n-ro 105) kaj la respondeculojn pri formado de la pastroj, por ke "ili zorge observu la filozofian formadon de tiuj, kiuj devos prediki la evangelion al la nuntempaj homoj, kaj eĉ pli zorge observu tiujn, kiuj fariĝos la esploristoj kaj instruistoj pri teologio" (samloke). Al ĉiuj la Papo petas profunde rigardi al la homo, "kiun Kristo elaĉetis per la mistero de sia amo" (n-ro 107). La lasta penso de la Papo en sia encikliko estis por Maria, Sidejo de Saĝeco: ke Ŝi estu "sekura haveno por ĉiuj, kiuj transformas sian vivon en esplorado de la vero" (n-ro 108).


Ĉe la fino de sia prelego, Ágota faris tre kortuŝan paroladon por danki la la multajn, kiuj memoras ŝian edzon, diakonon Johanon Kirsch. Jen la transskribo de ŝiaj vortoj:

"Mi ŝatus danki, ke vi memoras mian edzon. Ni dankas pro la preĝoj, la kunsento en vortoj, en pensoj, en muziko. Ni dankas pro via helpo. Johano havis viruson Hepatito C ekde multaj jaroj. Ĝuste antaŭ 9 jaroj li jam havis fortan internan sangadon. Tiam ankoraŭ kun la helpo de Dio la kuracistoj povis savi lin, nun bedaŭrinde ne… Al nia Dio mi estas dankema, ke ni povis koni unu la alian sur la tero dum 22 jaroj. Kiel vi ĉiuj scias, Johano estis bonega, saĝega homo, edzo, patro, diakono. Antaŭ lia foriro mi ne pensis, ke sen li mi povus vivi plu, ĉar li estis mia pli bona flanko. Poste venis la dato: la 22-an de majo, ĝuste mia naskiĝtago kaj la tago de sankta Rita vidvino - kaj la ĉiela naskiĝtago de mia edzo.

Vivo kaj morto kaj eterna vivo. Io disŝiriĝis, io glaciiĝis. 22 jaroj ŝajnas esti nur unu minuto.

Mi devis plu vivi, sed mi tuj sentis, ke mi ne restis sola. Mia edzo foriris, sed tamen li restis en mi, kun mi, inter ni. Mi povis esti forta kun la helpo de la sankta Spirito. Mi devis diri al niaj surteraj kvin infanoj, ke ili ĉi tie sur la tero ne plu povos paroli, renkontiĝi kun la patro. Tion mi provis diri al ili en la kapelo de la lernejo antaŭ la Sankta Eŭkaristio. Mi provis diri: mi estas forta - ankaŭ vi estu fortaj. Ni estas kune iel alie. Kaj ekde tiam Johano kaj mi kune daŭrigas la servadon al niaj infanoj, al la parencoj, al la komunumoj – du flankoj de la vivo. Estas daŭrigo kaj unueco: vivo estas tio – ne morto. Fortiĝas nia kredo, fortiĝas, profundiĝas la kontakto kun nia Dio. Ni ĉiuj fortigu plu nian kredon, la kontakton kun nia bona Dio en preĝoj, en meditoj, en atento al nia Dio ĉefe kun la helpo de la sankta Biblio, en bonfaroj kaj en karitato kaj en amo. Kun la graco de Dio estu tiel. Amen".

El kredo prezentata al kredo travivata: la ekzemplo de la unua hungara vira ordeno estis la temo de la sekva prelego de p. Szép,



La tabulo honore al diakono Johano.Kirsch en Szekszárd.

kiu priskribis la historion de la ordeno de la fratoj de sankta Paŭlo la unua ermito (kiun oni ne devas konfuzi kun la ordeno de Sankta Francisko el Paola). La ĉeesto de ermitoj en Hungario estas samaĝa kiel kristanismo. Ili vivis sole, ĉefe en monteta kaj monta regiono, sen ia formala fondo. Ili apartenis al la aŭtoritato de la loka episkopo. La plej malnovaj mencioj pri ermitoj koncernas tiujn de monto Mecsek. Bartolomeo, episkopo de Pécs, ĉirkaŭ la jaro 1225 donis al ili regulon kaj konstruigis monaĥejon por ili sur la monto de sankta Jakobo (la ruinoj videblas ankoraŭ hodiaŭ) kaj donis al ili ankaŭ terpecon. Alia mencio estas el la jaro 1250: sur monto Pilis beata Eŭsebio, kanoniko en Esztergom, kun 6 ermitoj konstruis monaĥejon titolitan al la sankta Kruco. Sed ankaŭ aliloke oni fondis monaĥejon. Ĝis la 14a jarcento ili ne havis komunan nomon. Oni scias, ke en la jaro 1263 ili turnis sin al Papo Urbano la 4a, por ke li permesu al ili uzi la regulon de sankta Aŭgusteno. La Papo komisiis episkopon Paŭlon de Veszprém por taksi, ĉu la havaĵo de la fratuloj tiam permesis al ili la uzon de la regulo. Sed li trovis tion ne sufiĉa, tial li mem skribis regulon por ili. Oni konas la ĉeeston de paŭlanaj monaĥejoj en Transilvanio kaj Kroatio ĉirkaŭ la jaro 1290. La ordeno multe kreskis dum la reĝado de Ludoviko la Granda, ilia favoranto. Li akiris en 1381 la relikvojn de sankta Paŭlo Ermito kaj ilin gardigis en Budaszentlőrinc. Samperiode sankta Paŭlo fariĝis kunpatrono de Hungario, kaj oni fondis la unuan monaĥejon en Pollando apud Ĉenstoĥovo sur la Hela Monto kun 16 monaĥoj el Hungario. En la 14a-15a jarcentoj ankaŭ ĉe la marbordo de Kroatio kaj Istrio fondiĝis novaj monaĥejoj. En tiuj 2 jarcentoj ili aperis en Romo kaj en Aŭstrio. Menciindas, ke en 1456 aperis la unua hungarlingva kompleta Biblio tradukita de Ladislao Báthori, membro de la paŭlana ordeno.

La sesa kongresa posttagmezo estis tempo de plia pilgrimado kaj momento de kortuŝa spirita ligiteco "kun tiuj, kiuj iris antaŭ ni". La kongresanoj atingis du urbojn: Bátászek kaj Szekszárd. En Bátászek oni vizitis la preĝejojn, kiuj havas la plej altajn turojn en Hungario. En Szekszárd oni vizitis la urbocentran preĝejon kaj la preĝejon en la "novurbo": en tiu preĝejo ekde 1998 Johano Kirsch estis diakono kaj parokdirektoro.

La Meson por ĉiuj mortintoj ĉefcelebris p. Attila Szép kaj kuncelebris p. Lajos Kóbor, p. Luigi Alfano kaj p. Hatto von Hatzfeld. Ankaŭ kuncelebris la paroĥestro de Szekszard László Bacsmai.

Dum la tre emocia prediko, p. Attila diris, ke en tiu preĝejo li estis baptita kaj tie li antaŭ ricevis la unuan komunion kaj konfirmacion. Kortuŝe li ankaŭ parolis pri diakono Johano Kirsch – forpasinta ne multajn monatojn antaŭ la kongreso - en kies domo renkontiĝis esperantistoj kaj oni travivis multajn belajn momentojn kune. Tie ne estis simpla movado, sed vera kristana etoso.

Post la Meso, malantaŭ la preĝejo kaj proksime al la domo, kie vivas familio Kirsch, oni inaŭguris la tabulon honore al diakono Johano. Apude ankaŭ troviĝas du tabuloj, de la unua hungara esperantisto Gábor Balint (1844-1913) kaj Pál Lengyel (1868-1932), kiu estis la unua esperantisto en Szekszárd.

La ĉeestantojn salutis Marija Belošević. Ŝi esprimis ĝojon, ke ene de mallonga tempo estis realigita la tabulo, kiu interalie estas omaĝo al 125 jaroj de E-o kaj 100 jaroj de la unua IKUE-kongreso en Budapeŝto. La tabulon malkovris p. Lajos Kóbor kaj Zsófia



*Marija Belošević enkondukis al la inaŭguro de la memortabulo pri diakono Kirsch.*

Kirsch, la plej juna filino de Johano Kirsch.

La paroĥestro, László Bacsmai, benis la tabulon kaj esprimis ĝojon, ke ĝi trovis ĝustan lokon tie. “Sen Johano ni sentas mankon en la preĝejo kaj en la paroĥo – li diris - sed ĉar lia vizaĝo estas ĉi tie, ni sentas lin ĉi tie. Mi estas certa pri tio, ke kiam ni trapasos ĉi tie kaj kiam ni rigardos la vizaĝon de Johano, ni memoros pri li kaj li helpos nin por niaj decidoj”.



Post la vespermanĝo en Kolping-lernejo, kie Johano laboris, la kongresanoj preĝis ĉe lia tombo kaj la du IKUE-vicprezidantoj surmetis florkronon. En Szekszárd estis ankaŭ ege kortuŝa la renkontiĝo kun la patrino de Johano. Esperantistoj kuraĝigis ŝin kaj promesis preĝojn ankaŭ por ŝi.

## Sepa tago: vendredon, la 20an de julio
## Gloro de la Kruco – lumo kiu trarompas la malhelon de pekado



La antaŭlasta tago de la 65a Kongreso de IKUE komenciĝis per la Meso en la Preĝejo eksa Moskeo, kiun ĉefcelebris p. Hatto von Hatzfeld kaj kuncelebris p. Lajos Kóbor, p. Luigi Alfano kaj p. Attila Szép. La Meso estis tiu de la “Gloro de la Kruco”: sed kiun gloron?, demandis la ĉefcelebranto komence de sia prediko. Kristanoj hezitis dum 3 jarcentoj montri Kriston krucumitan. Ili ja sciis pri la skandalo de la kruco, pri kio jam la apostolo Paŭlo skribis, sed oni ŝajne tion forgesis. Klarigante la skandalon, la predikanto aldonis, ke en tio troviĝas la plej profunda vero de kristanismo: Dio mem iĝis domo, prenis sur si nian homecon kun ĉio, kio estas homa, inkluzive la morton. Tial la kruco ne plu estas nur kruda montrigilo sed iĝis signo de Dia amo al ni kaj de la savo kiun li donacis al ni.

Se ni parolas pri la “gloro de la Kruco”, ĝi povas temi nur pri la gloro de la Dia amo, kiu realiĝis en la sinofero de Jesuo. Kvankam ni do scias pri la krueleco de la morto, kiu en ĉi tiu mondo forigas homojn for de parencoj kaj amikoj, ni povas glori nian Dion, kiu per la kruco de Jesuo nin savas, ĉar li ne deziras, ke ni restu en la morto, sed donacas ĉion, por ke ni vivu, diris p. Hatto.

En la episkopa palaco sekvis la prelego “La lumo de la kredo konsumas la mallumon” de Balázs Garadnay, ĝenerala vikario,

kanoniko, paroĥestro de la katedrala paroĥo en Pécs.

La amo de Dio kaj nia respondo al ĝi: la lumo de nia kredo konsumas la mallumon, la malhelon de la senscio kaj de peko. La kredo estas pli altranga lumado, ĉar la menso malfermiĝas al la supernatura lumo.

La kredo estas intelekta ago, do ĝi ne estas naiveco, ĝi ne estas "mi opinias", sed ĝi estas sankta konvinko pri tio, kion oni ne vidas. En tiu lumo oni povas vidi pli ol en la natura lumo - en tio aperas la Senfina Dio, kaj en tio ni trovas la respondon pri la kulmina signifo de nia vivo.

La kredo donas tiun liberecon, kiun la nekredeco volas limigi. La kredo malfermas novan dimension antaŭ ni: ĝi levas nian rigardon kaj donas novan vidmanieron al ni. Alimaniere dirite, ni vidas la eventojn de nia vivo: tiel, kiel mem la Sinjoro volas. Tial la kredo kondukas nin al senkondiĉa submeto je Dio: ni lasas nin mem kun plena konfido en la manojn de Dio.

La preleganto ankaŭ atentigis, ke la kredo estas donaco. Dio vekas ĝin en ni, sed ne sen ni. La kredo estas homa respondo al la revelacio de Dio. Ni ekkonas, ke Dio tuŝis nin. Fronte al tio, kion Li jam pretigis kaj donis al ni, estas nia tasko respondi. Nur tian rolon ni ludas en la travivo de la kredo, sed tion ni devas fari.


Vikario Balázs Garadnay.

Sekvis la prezento "Lumo fine de la mondo" de Rita Rössler-Buckel kaj Franz-Georg Rössler pri Jakoba vojo tra Lurdo, Fatimo kaj Montserrat al Santiago de Kompostela.

Ĉe la fino de la antaŭtagmeza programo Marija Belošević prezentis filmon "Kredo" de la Komunumo *Cenacolo* (vizitita de la IKUE-kongresanoj en 2011). Ŝi ankaŭ prezentis novajn eldonaĵojn, i.a. la E-lingvan tradukon de la libro de episkopo de Sisak Vlado Košić "La paroĥestro ĉe la unua frontlinio" kaj la kolekton de la prelegoj de la pasintjara kongreso. Ankaŭ estis prezentitaj la respondoj kolektitaj ĉe esperantistoj koncerne la Kredkonfeson, kaj fine oni pridiskutis la kongresan deklaron **(*)**.


Krucvojo sur la Kalvaria Monteto.

Dum la posttagmezo oni preĝis Krucvojon sur la Kalvaria monteto; oni vizitis la terason de la "Ok Beatecoj". Antaŭ ol reveni al la kongresejo, oni metis florkronojn en la Esperanto-parko.

Dum la vespera programo okazis la t.n. adiaŭa vespero, kiun kunordigis p. Hatto von Hatzfeld. Oni prezentis plurajn muzikajn pecojn kaj recitalojn, i.a. estis prezentita kanto "IKUE en urbo Peĉo", kiun verkis Franz-Georg Rössler.

*(*) pro spacomanko ĝia teksto aperos en la venonta numero.*

*Oka tago: sabaton, la 21an de julio*

## Adiaŭo per dankemo



En la lasta tago de la 65a Kongreso de IKUE la Meso okazis en la kapelo *Corpus Christi* de la Katedralo. Ĝi estis danka Meso ĉefcelebrita de p. Lajos Kóbor kun pastroj Hatto von Hatzfeld kaj Attila Szép.

Dum la prediko p. Kóbor diris, ke dum la tuta semajno oni ricevis pere de la kredo multe da graco, do pro tio li invitis danki Dion: "ni oferos ĉi-sanktan Meson unue por danki Dion, due por peti de Li la gracon por la sekvontaj horoj, ke ni povu trankvile vojaĝi kaj atingi niajn konatulojn".

Do, danki Dion per la Meso, ĉar ne nur la kredo kreskis: dum la kongreso oni ankaŭ ricevis plifortigon de la espero kaj poste venos la karitato: "ĉi tiuj tri estas kune", diris p. Kóbor per la vortoj de la Apostolo. Fakte sankta Paŭlo skribis: estas la kredo, la espero kaj la karitato, sed la plej granda estas la karitato. "Kiam ni nun forlasas la kongresejon kaj foriras hejmen – substrekis p. Kóbor – ni kunportos ne nur la kredon, sed ankaŭ la karitaton, pere de ĝi ni povas travivi vivantan kredon kaj ĝin transdoni".

"Kaj se ni disdonas la kredon kaj la karitaton – li daŭrigis – tiel ni povas ankaŭ esperantigi kelkajn homojn kaj ili eksentos tra nia vivo kaj konduto la veran kredon, kaj oni povos diri "jen via parolo estas vero, kaj ankaŭ mi sekvos Jesuon Kriston".

Vortoj, kiuj kronis la spiritriĉan IKUE-kongreson en Pécs.

*Ĉi tiu numero de EK estas 100%-a ujo de raporto pri nia 65a kongreso, frukto de kunmeto de la kroniko, kiun dum la kongresaj tagoj la vic-prezidantino de IKUE Marija Belošević redaktis kaj dissendis pere de elektronika poŝto al multegaj IKUE-anoj. Entute rimarkinda kaj gratulinda laboro, kiun nia redakcio uzis. Ĉiujn kompletajn tekstojn kunmetis por disponigo en interreto Vitor Luiz Rigoti dos Anjos (http://vitorluiz.6te.net/?p=645): el lia paĝaro ni ĉerpis multegajn fotografiojn: ankaŭ ilin faris Marija Belošević. Krome, ŝi, kune kun Giovanni Daminelli, p. Albrecht Kronenberger, Stefan Lepping kaj Miloslav Šváček kontribuis al korekto de preseraroj en ĉi tiu EK-numero, per "aglookula" provlegado.*